

ĈEA-Retkomunikoj 2014/03



ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

- [1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO](#)
- [2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO](#)
- [3. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ](#)
- [4. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ](#)
- [5. MULTMEDIAJ INTERESAĴOJ](#)
- [6. ĈEJ AKTIVAS](#)
- [7. LISTO DE ARANĜOJ](#)

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la tria numero de ĈEA-Retkomunikoj en la jaro 2014. Mi esperas, ke via somero estis agrabla kaj vi partoprenis kelkajn esperantajn aranĝojn. Sed ankaŭ dum aŭtuno okazos pluraj interesaj eventoj. Ne nur pri ili vi povos legi en tiu ĉi numero. Revenis ankaŭ rubriko ĈEJ AKTIVAS, do vi povas legi, kiel aktivis nuntempe Ĉeĥa Esperanto-Junularo.

Do, agrablan legadon!

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-Retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko de la naturo!



**Redaktoro Miroslav Hruška
ĉe Zamenhof-strato en Gdansko**

2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato KUN KOLORAJ FOTAĴOJ elŝuteblas [ĈI TIE](#).

ARKIVO de Retkomunikoj troveblas [ĈI TIE](#).

3. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ

3.1 KIO POR VI PREPARATAS DUM LA INAŬGURO DE LA NOVA EKSPOZICIO

La 27-an de septembro 2014 je 10:30 okazos en Svitavy inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio, ĉi-foje pri "Esperanto kaj kolektado". Preparlaboroj por ĝi nun kulminas kaj certas, ke ankaŭ nekolektemuloj povas antaŭĝoji vere buntan kaj interesan prezenton, ne nur pri Esperanto-temoj, sed ankaŭ ĝeneralajn kolektojn ofertitajn de esperantistoj (ankaŭ eksterlandaj) - i.a. poŝtmarkoj, historiaj bildkartoj, moneroj kaj bankbiletoj de la mondo, kuriozaj bierpletoj kaj sapetoj, kalendaretoj, pupoj



de la mondo k.a. Kompreneble interesitoj pri Esperanto-movado tie trovos multajn ĝis nun ne prezentitajn materialojn, eĉ el frua historio. Posttagmeze vi povas - krom vizito de borso kaj filatela ekspozicio - ĝui ankaŭ vinon kaj zimbalonmuzikon sur la ĉefa placo. Vespere ekde 19:30 estas preparata projekciado kaj parolado pri Malajsio far Pavel Polnický, kiu tie pasigis ripete kelkajn monatojn.

Por la semajnfino aliĝis gastoj el Germanio kaj Aŭstrio, kun kiuj vi povos praktiki Esperanton.

Via intereso kaj reago estos por ni subteno kaj kuraĝigo en nia postulema volontula laboro!

Ni aprezos, se ankaŭ vi, kiuj planas veni nur por unu tago, informos nin pri via alveno (al retadreso svitavy (ĉe) esperanto.cz), por ke ni antaŭsciu proksimume, kun kiom da personoj ni povas kalkuli (ankaŭ pro bezonata kvanto de frandaĵoj :-).

Ni esperas kaj antaŭĝojas vian intereson kaj renkontiĝon kun vi!

Nome de la Muzea grupo elkore invitas vin Libuše Dvořáková kaj Pavla Dvořáková

3.2 NOVAĴOJ PRI ĈEA-KONGRESO EN PROSTĚJOV

Daŭre vi havas la eblecon aliĝi al nia plej pinta aranĝo de la jaro, dum kiu ni ne nur laboros, lernos kaj diskutos, sed ankaŭ kune babilos kaj amuziĝos! Dum la sabata vespero krom tradicia balo kun riĉa tombolo atendas vin ankaŭ koncerto de vakera muzikgrupo kaj fama "bardo sen barbo" Georgo Handzlik el Pollando. En la 1-a etapo ĝis 15.9. aliĝis 50 personoj. La loĝkapacito de la studenthejmo estas 66 lokoj - restas do la lastaj 16 liberaj litoj. Tial kaze de intereso ne risku aliĝi tro malfrue!



En Kalendaro de aranĝoj [ĉi-tie](#) estas elŝutebla skiza programo kun horaro. Interesitoj pri kontribuo al la vendreda vespera programo bv. skribi al pavla.dvorakova (ĉe) esperanto.cz. La samo validas, se vi havas intereson okazigi apartan kunvenon de via sekcio, komisiono, labor- aŭ interesgrupo.

Kandidatoj por la nove elektotaa ĈEA-estraro estas plu serĉataj kaj bonvenaj (kontakto por interesitoj: chrdle (ĉe) kava-pech.cz).

Ni antaŭĝojas vian aktivan partoprenon, kiu subtenos nefacilan realigadon de nia komuna ideo!

Amike ĈEA-komitato

3.3. BUSEKSKURSO AL LA 100-A UNIVERSALA KONGRESO EN LILLE (FRANCIO)

Ĉu vi planas partopreni la jubilean UK-on kaj serĉas konvenan manieron?

Asocio de esperantistoj-handikapuloj (AEH) organizos en tiu tempo (24.7.-2.8.2014) por siaj membroj kaj nemembroj busekskurson. Krom la kongresa programo vi povas ĝui posttagmezajn buskeskursojn al la ĉirkaŭaj vidindaĵoj (inkl. Belgion). La plej favoran prezon havos aliĝintoj al UK ĝis 25.9.2014. Ĉeĥlingva unua informilo kaj aliĝilo elŝuteblas en Aktualajoj [en tiu ĉi artikolo](#).



Limdato por aliĝiloj estas 14.10.2014, limdato por antaŭpago estas 25.10.2014.

Ne hezitu kaj aliĝu ĝustatempe! Kontaktadreso: aeh (ĉe) esperanto-eh.eu

4. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

Ni invitas vin al regulaj vizitoj ĉe <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality> kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

Artikoloj en esperanto en www.esperanto.cz

Individua membreco en UEA 2015



Individuaj membroj de UEA kaj interesiĝantoj pri individua membreco atentu, ke pagante tuj vi povas ŝpari, ĉar ekde la 1-a de oktobro jam validos pli altaj membrokotizoj (en krampoj). Vi do povas pagi ankaŭ por la jaro 2015 laŭkategorie por MG 176.- Kč (ekde la 1-a de oktobro 190,-), MJ 440,- Kč (480), MA 1100 Kč (1200).

NOPROBLEM - nova muzikgrupo en Esperantujo



Ĉeĥlingva muzikgrupo NOPROBLEM el la moravia urbo Kostelec na Hané kantas nun ankaŭ en

Esperanto. Post lastjara premiera koncerto ili larĝigis sian repertuaron kaj eldonis kompaktdiskon, kiu inkluzivas ankaŭ 6 kantojn en esperantlingva versio.

Nur ĉeĥlingvaj artikoloj:

Připravuje se zájezd na 100. Světový esperantský kongres ve Francii

(Preparatas busekskurso al la 100-a Universala kongreso en Francio)



Svaz zdravotně postižených esperantistů připravuje pro zájemce autobusový zájezd na jubilejní 100. Světový kongres esperanta v

severofrancouzském Lille, který se bude konat 25.7.-1.8.2015.

Uzávěrka přihlášek je 15.10.2014, termín pro platbu zálohy je 25.10.2014. Máte-li zájem o další informace, čtěte dále!



Eseo de d-ro Max Kašparů en Esperanto

Eksterordinara publikaĵo „Ĉeĥa vizio de Eŭropo? aŭ Manlibro por nia prieŭropa debato“, kiun en aprilo 2014 ĉeĥlingve eldonis prestiĝa eldonejo Academia (de Ĉeĥa Akademio de Sciencoj) entenas ankaŭ eseon de konata psikiatro, publikigisto kaj fervora esperantisto doktoro Max Kašparů, nomitan „Eŭropo – krizoj de lampoj kaj naŭo de estonta tempo“. La sendube legindan pensigan pripenson (enhavantan ankaŭ temon de internacia lingva komunikado) vi povas nun legi ankaŭ en Esperanta traduko.



Praga prelego de profesoro Tonkin

La 14-an de februaro 2014 okazis en la sidejo de Unuiĝo de interpretistoj kaj tradukistoj en

Prago solena bapto de ĉeĥlingva eldono de la libro Maskerado ĉirkaŭ la morto de Tivadar Sörös

(en Esperantujo konata kiel Teodoro Ŝvarc) en la eldonejo KAVA-PECH. La programo komenciĝis per interesa anglalingva prelego de profesoro Humprey Tonkin, kiun nun ankaŭ la nepartoprenintoj povas ĝui pere de video ne nur en la originalo, sed ankaŭ legante esperantlingvan tradukon de Brian Moon.



Článek v MFDnes - Proč nezavést v EU esperanto?

(Artikolo en gazeto MFDnes - Kial ne enkonduki en Eŭ Esperanton?)

31. května 2014 vyšel v MFDnes článek od redaktora, spisovatele a překladatele Miloše Urbana. Přinášíme vám text v plném znění.



Světový kongres esperanta v roce 2016 bude hostit Nitra

(Universala Kongreso okazos en jaro 2016 en Nitra)

Touto aktualitou bychom vás rádi informovali o tom, že po sedmi letech, kdy se Světový kongres esperanta konal nedaleko České republiky, se bude tato nejdůležitější a nejprestižnější akce esperantského hnutí v roce 2016 konat na Slovensku, přesněji v Nitře. Rozhodnuto o tom bylo na již proběhlém Světovém kongresu esperanta v Buenos Aires v Argentině.



O esperantu opět v brněnském rozhlase

(Pri esperanto denove en radio de Brno)



24.8.2014 od 15:05 v pravidelném pořadu „Rendez-vous s Marcelou Antošovou“ byl odvysílán nový rozhovor s Josefem Vojáčkem, který vyučuje esperanto a interlingvistiku na Masarykově univerzitě. Zájemcům nabízíme interview k poslechu z rozhlasového archívu.

Esperanto je nejvhodnějším komunikačním prostředkem



(Esperanto estas la plej taŭga komunikilo)

2.8.2014, u příležitosti konání Světového kongresu esperanta v Buenos Aires, Boleslavský deník

otiskl rozhovor s paní Jindřiškou Drahotovou. Přinášíme vám článek v plném znění.

Setkání esperantských spisovatelů

(Renkontiĝo de esperantaj verkistoj)

Na Letní esperantské škole v Nitře, která se konala 12.-20.7.2014, proběhlo i mezinárodní setkání autorů esperantské beletrie. O akci natočila a 20. července v pořadu „Týden v kultuře“ odvysílala reportáž slovenská televize TA3. K jejímu sledování vás nyní zveme. Nabízíme vám zároveň stručný přehled ohledně fenoménu „Beletrie v jazyce esperanto“.



Miroslav Malovec nositelem ocenění Wikimedia ČR

(Miroslav Malovec ricevis premion de Wikimedia Ĉeĥio)

Významný český esperantista Miroslav Malovec z Brna získal ocenění a čestné členství od české pobočky Nadace Wikimedia, zejména za své zásluhy jakožto zakladatel české verze Wikipedie. Dalším z oceněných byl pro zajímavost profesor Jan Sokol.



Jazyková rubrika č. 3

(Lingva rubriko numero 3 - Vortoj similaj kun diversaj signifoj)



Touto aktualitou pokračujeme v „jazykové rubrice“, kterou jsme začali na jaře loňského roku (konkrétně tento článek). Podobně jako v druhém díle poradny bychom Vás rádi zajímavou formou upozornili na slova v esperantu, která sice vypadají podobně, ale mají různé významy. Všechna dnes prezentovaná slova budou slovesa, příště si představíme některá podstatná jména. Ke každé dvojici (případně trojici či čtveřici) slov bude jedna český překlad těchto slov, ale také doprovodný obrázek.

La duan numero de lingva rubriko vi povas legi [ĉi tie](#).

5. MULTMEDIAJ INTERESAĴOJ

5.1 VIDEOJ

[Konsilu min, doktoro Zamenhof - skeĉo de Liven Dek](#)

[Videomomentoj el la 87a SAT-Kongreso](#)

[Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice \(Ĉeĥio\)](#)

[Esperanto en la gazetaro de via regiono](#) - instiga instrukcia filmeto el la kanalo de Emilio Cid (Brazilo)

[Pri Somera Esperanto-Studado 2014 en la slovaka televido](#)



5.2 SONREGISTRAĴOJ

[Tibor Sekelj - Kolektanto de ĉielarkoj \(rakonto\)](#)

[Pri hundeto kaj katineto de Josef Čapek \(skeĉo\)](#) - aktoras Jaroslava Malá, Milada Zemanová kaj Petr Chrdle

[Malliberulo en Bezděz \(poemo de Svatopluk Čech\)](#) - deklamas Miroslav Smyčka

[Jaroslav Ježek - Ĉapelo en vepro \(kanto\)](#) - tradukis kaj interpretas Vladimír Türk

[Neide Barros Rêgo -Eta Ĝardeno](#) - kanto en interpreto de konata brazila kantistino

5.3 FOTOGALERIO

[Tema ekspozicio "Esperanto kaj muzoj"](#)




Karel Bartošek



Ho-Song, Jižní Korea



Constantin Barjoveanu,
Rumunsko



Felix Moscheles, Velká Británie
Věroslav Bergl



José Leite de Oliveira Jr., Brazilie



Stanislav Krajiček



Anna Vyšínková




Pavel Rak

6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Václav Zouzalík)

Je la 11-a de septembro Praga klubo de ĈEJ komencis siajn renkontiĝadojn en nova akademia jaro. La renkontiĝoj okazas ĉiu ĵaŭde po du semajnoj je la 19-a horo en la strato Ve Smečkách 25 en Prago.



Je la 16-a de septembro okazis la unua interreta kunsido de ĈEJ. Tiu ĉi "nova" formo de renkontiĝado estis elektita pro longa distanco inter estaranoj de ĈEJ.

Dum SES en Slovakio okazis neformala renkontiĝo de ĈEJ-estraro. Ni ĉefe babilis pri uzado de nia retpaĝaro, partoprenado de edukaj okazaĵoj kaj propagado de Esperanto dum neesperantaj okazaĵoj. Václav Zouzalík dum la jaro disvastigis liberajn esperantajn verkojn en la Interreto. Li alŝutis al Vikimedia Komunejo mallongan filmon "[Esperanto Geedzigas](#)" kaj muzikvideaĵojn "[Ĉu Vi Imagas](#)" kaj "[La Fina venk](#)", la unuajn du ankaŭ al Interreta Arĥivo (<https://archive.org/details/EsperantoGeedzigas> kaj https://archive.org/details/JohannesMueller_CxuViImagas). La videaĵo "Ĉu Vi Imagas" iĝis Dosiero de la tago kaj je la 16-a de aprilo estis spektebla sur la ĉefpaĝo de Vikimedia Komunejo. Li ankaŭ kreis esperantajn subtitolojn por libera filmo [Sintel](#) kaj por neoficiala propaganda videaĵo de [Vikidatumoj](#).

Nia longtempa membro kaj refondinto de ĈEJ Marek Blahuš je la 16-a de aŭgusto edziĝis kun sia koramikino Veronika. Ni kore gratulas kaj deziras al ili ĉion plej bonan en ilia nova vivo.

Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>



7. LISTO DE ARANĜOJ

2014-09-25/28 [Regiona filatela ekspozicio kun salono de Esperanto](#)

2014-09-27/28 [Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto kaj kolektado", Tutŝtata filatela ekspozicio + Kleriga dimanĉo en Svitavy](#) - Info: svitavy@esperanto.cz

2014-10-24/26 [ĈEA-Kongreso en Prostějov](#) - Info: cea@esperanto.cz

2014-10-30/11-02 [3-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice](#) Info: verdastacio@gmail.com

2014-11-07/09 [Brila Internacia Esperanto Renkontiĝo en Poděbrady](#)

2014-11-13/16 Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), info: <http://kaest.ikso.net/>

2014-11-29 [Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek](#) - Info: pisek@esperanto.cz

2014-12-13 Marcipana Kristnasko en Svitavy Info: svitavy@esperanto.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

ĈEA-Retkomunikoj 2014/03

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – retkomunikoj@esperanto.cz

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš, Václav Zouzalík